

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Legi en fremdaj lingvoj

Prelegonto: Viktoria Schmidbauer (Aŭstrio)

Legante romanojn en pluraj lingvoj kaj studante lingvistikon, mi interesiĝas pri la procezoj okazantaj dum legado en fremdaj lingvoj: Kio malsamas de la pli kutima legado en nia gepatra lingvo? Kio malfacilas, kiam ni legas libron en lingvo, kiun ni ne bone regas? Kaj kial mi malgraŭe faras kaj rekomendas tion?

En ĉi tiu prelego mi pritraktos la malfacilaĵojn de fremdlingva legado, interesajn aperaĵojn dum la legado, siajn efikojn kaj uzeblajn rimedojn. Mi rakontos pri mia propra sperto kaj vidpunkto, plie estos aldonitaj sciencaj perspektivoj.

Ĉeesta programo. Estas registrita.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 22-an de marto 2022 je la 18-a h.

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Cetera programo en marto

La 24-an **Lanĉo de ekspozicio Světelné stopy** de Gabriela Kopcová, Rajhrad, Památník písemnictví na Moravě, je la 16-a h. Ĉeĥe. Kiu volas vojaĝi kune, skribu al mi

La 29-an **Vojaĝado per Esperanto** – diskuto el la ĉeĥa rete per Skajpo (cílem diskuze je natočit video v češtině o cestování prostřednictvím esperanta. Prosím, abyste si připravili krátké vystoupení, nejlépe i s ukázkou fotogarfí apod.)

Programo en aprilo

La 5-an **Otakar Batlička, ĉeĥa Jack London** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

La 12-an **Homa cerbo kaj esploroj de atentemo kaj memoro** – Josef Vojáček. rete per Skajpo

La 19-an **Refleksivaj pronomoj** – Milan Kolka, ekzercoj. Občanský klub, Hybešova 65a

La 26-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita.* rete per Skajpo

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de aprilo kaj por majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Ni rekomendas

- Vizitu [Arbaristan Panteonon](#), belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika

transporto. Por ke vi povus pli bone plani ekskursojn en tiu ĉi regiono, sur la retejo nove aperis sekcio [Proponoj por ekskurzoj](#). Jam unu eskurzo estas priskribita en Esperanto – dekokkilometra promeno [De rando de Brno al Adamov tra du belvidejoj](#).

- La 9–17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĒDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

Instruado de Esperanto en Bartošovice okazonta komence de aprilo estis nuligita.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Milan Kolka
prezidanto